Martinus Institut

N-ro 2 - 2012

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus


**Martinus:**
Partikloj, malpleno kaj pensoforto

**Martinus:**
Enkonduko al La Eterna Mondbildo, libro 5

**Mogens Groth kaj Mogens Rude:**
Du fruaj danaj pioniroj

**Erik Gerner Larsson:**
Martinus 9, La akceptemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 1

**Ole Therkelsen:**
Profetaĵoj pri Martinus 1, Rudolf Steiner



© Martinus Institut 1981 Reg. 45



© Martinus Institut 1981 Reg. 46

Esperanto

**Nova simbollibro – La Eterna Mondbildo, 5-a volumo**
En aprilo 2012 Martinus-Instituto eldonis novan libron "La Eterna Mondbildo, 5-a volumo" surbaze de postlasitaj simboloj kaj surbendigitaj prelegoj de Martinus en kiuj li klarigas 33 simbolojn (temas pri n-roj 45-77). En la dua parto de la libro estas elektitaj citaĵoj de la Martinus-literaturo pri la temoj de la simboloj. Mi mem partoprenis en la redakta laboro de tiu nova simbollibro. Martinus klarigas, ke la simboloj alcelas esti materialo, per kiu oni povas montri, ke la kaŭzo de ĉiuj malsanoj estas fuŝkontaktoj en la pensmondo. Sur la frontpaĝo vi vidas la du unuajn simbolojn n-ro 45 kaj 46, kiuj estas klarigitaj en ĉi tiu numero de Kosmos. Krome tiuj du simboloj estas klarigitaj en la ĉefa artikolo de Martinus "Partikloj, malpleno kaj pensoforto".

**Esplorado pri la dana esperanto-movado**
Plej ofte oni parolas pri Frederik de Skeel-Giørling (1876-1910) kiel patro de la dana movado, kaj pri Marie Schrøder (1882-1909) aŭ Margrethe Noll (1874-1962) kiel patrino de la dana movado, sed ŝajne oni forgesis la plej fruajn danajn pionirojn Christian Nielsen (1827-1896) kaj P.K. Toksvig (1851-1931). S-ro Toksvig loĝis en Nykøbing Sj. proksime al Martinus Centro en Klint. S-roj Mogens Groth Jørgensen kaj Mogens Rude faris esploradon pri tiuj du fruaj pioniroj, kiun ni dankeme povas prezenti en ĉi tiu numero.




*Malnova sigelo de regiono Odsherred [Odts-Herrits segel]*

**La kvinpinta stelo**
La verda kvinpinta stelo estas simbolo de la esperanta movado. La kolora kvinpinta stelo en la Martinus-simboloj n-roj 4, 11 kaj 33 estas la simbolo de kosma konscio aŭ perfekteco. La kvinpinta stelo ankaŭ estas simbolo de la loka regiono "Odsherred", kie Klint kaj Nykøbing Sj. situas.

Interese estas, ke jam en 1897 la plej unua nacia esperanta asocio *Societo Esperantista de Danujo* fondiĝis en Nykøbing Sj. en la kvinpinta regiono Odsherred.


*Ole Therkelsen*



*Laŭdire scio kiel ondoj iras de Martinus-Centro, Klint al la tuta mondo por helpi al homoj akiri kosman konscion.*

# Partikloj, malpleno kaj pensoforto

de Martinus



## 1. Makrokosmaj partikloj kaj malpleno

Kiam ni en sennuba nokto rigardas supren al la stela ĉielo, ni vidas, ke ĝi prezentas bildon de lumaj partikloj kaj malplena spaco. La ĉielo konsistas el partikloj kaj malplena spaco, ne nur tiel fore, kiel atingas nia vidkapablo, sed tiel fore, kiel oni povas observi per optikaj rimedoj, milionojn da lumjaroj en la senfinan spacon. Devas esti komprenebla afero por ĉia evoluinta observanto, ke tiu enorma spaco ne povas ĉesi kaj havi finon.

Sed kion ni efektive vidas? – Ni vidas la bazan principon de la universo, kiu ĝuste estas partikloj kaj malplena spaco. Ni iomete scias pri tiuj partikloj, ni scias, ke ili estas gigantaj fortocentroj en formo de sunoj ŝargitaj per tiaj energioj kaj fortoj, kiuj estas bezonataj, por ke vivo povu ekzisti en fizika stato. Tiuj fortoj de la vivo, tiuj eternaj bazaj energioj radias de la suncentroj al astroj kaj planedoj, al vivaj fizikaj mondoj, kiuj reale estas organismoj por vivuloj makrokosmaj. La planedoj estas vivuloj, sed vivuloj ne povas vivi en ia nenio. Ili povas vivi nur en ia por ili taŭga makrokosmo, kaj tiel ni ja ankaŭ vidas, ke nia propra planedo, la terglobo, troviĝas en pli granda sistemo, kiu havas nian sunon kiel fortocentron. Ni vidas, ke al nia suno estas ligitaj pluraj planedoj kun kromplanedoj aŭ lunoj, same kiel nia terglobo havas lunon. Estas tia sistemo de planedoj kun suno kiel fortocentro, kiun ni nomas sunsistemo, kaj tia sunsistemo estas ankaŭ organismo de vivulo. Kompreneble tiu vivulo ankaŭ ne povas vivi en nenio, kaj tial ĝi troviĝas en ankoraŭ pli granda sistemo, kiu konsistas el multaj sunsistemoj. Tian kolekton da sunsistemoj ni nomas lakta vojo aŭ galaksio, kaj ankaŭ ĝi estas organismo de viva makroestulo. Ni scias, ke en la universo ekzistas aliaj galaksioj ol tiu, en kiu troviĝas nia suno kaj nia tero. Tiuj galaksioj estas kunlaborantaj fenomenoj en tia sistemo, kiu ankaŭ estas rekonebla kiel organismo por viva kaj por ni superkosma makroestulo. Ĉi tie ni atingas la limon de tio, kion la terhoma sensokapablo plilongigita de teknikaj optikaj aparatoj povas observi. Tiuj sistemoj ĉiuj troviĝas unu ene de alia, kaj tiu superkosma sistemo estas nur ŝajna limo, ĉar efektive tio daŭras senfine. "Partikloj kaj malplena spaco" estas fundamenta sistemo en la tuta makrokosma universo, sed ankaŭ fundamente estas, ke la partikloj estas vivuloj.

## 2. Partikloj estas organismoj de vivuloj

Ĉiu unuopa el la partikloj de la universo estas organizita fortocentro de la kosmaj bazenergioj, kiuj ĵetas reflekton per la sep koloraj radioj de la spektro: ruĝa, oranĝa, flava, verda, blua, indiga kaj violkolora. Ni konas tiujn energiojn de la kosmaj analizoj en *Livets Bog*. Ili plenumas precize tiujn kondiĉojn, kiuj necesas, por ke la eternaj kosmaj mioj povu krei organismojn kaj konscion kaj

per tio aperi kiel vivuloj. Tiuj energioj estas bazo de la fizika materio en formo de minerala, vegetala kaj animala materioj kiel ankaŭ por la veraj konscifortoj: instinkto, pezo, sento, inteligento, intuicio kaj memoro, kiujn la praavido kaj la patrina energio aktivigas. Ke tiuj makrokosmaj partikloj estas vivaj iĝas fakto per tio, ke ili senescepte konsistas el kombinoj de movo, vibroj kaj ondolongoj. Movo estas la plej altranga signo de vivo. Kiel alie ni eltrovu, kio estas viva, kaj kio estas senviva? Io absolute morta neniel povus krei movon. Ĉiuj lumaj astroj, tiuj por ni grandaj partikloj en la senfina universo, estas korpoj, kiuj esprimas vivon. Ĉar vivo same estas kiel spertado kaj manifestado, do, okazas spertado kaj manifestado pere de la grandaj makrokosmaj partikloj, kiujn ni nomas planedoj, sunoj, galaksioj kaj ankoraŭ pli grandaj sistemoj. Makrokosmo estas konscio kaj vivo.

Sed kio do estas la nemezurebla malplena spaco, kiu troviĝas inter la makrokosmaj partikloj? – Ĉi tie ni memoru, ke vivuloj ne sole konsistas el fizika korpo. La tuta strukturo de la movoforto, kiu troviĝas ekster la kampo de la fizikaj sensoj, apartenas al tiu realaĵo ĉe la vivulo, kiu estas konata kiel ĝia spirito, kio signifas ĝiaj konscio kaj pensoj. En la fizika sfero tiu realaĵo estas sensebla nur pere de ĝiaj efikoj en la fizika materio. La malplena spaco inter la planedoj, sunoj kaj galaksioj reale ne estas ia malplena spaco, ĝi estas plenigita de konscio aŭ spirito de vivaj makroestuloj. La malplena spaco estas la loko de la spirita mondo, kiu estas malantaŭ ĉiuj fizikaj fenomenoj. Kaj ĉar la spirita strukturo en la vivulo estas el elektra naturo, la malplena spaco de la universo estas plenigita de elektraj radioj kaj ondoj fare de la pensado de tiaj makrokosmaj estuloj. Tiu aktivado de elektra forto etendiĝas longe preter tion, kion terhomoj kapablas percepti per fizikaj sensoj aŭ mezuri per teknikaj aparatoj. Tio, kion la homoj nomas elektro, estas aparta parto de la vivoforto de la terglobulo, kiun la terhomoj jam lernis uzi. Sed krom tio daŭre estas tre limigite, kiom la homoj sur ilia nuna evoluŝtupo kapablas percepti de la radiaj fortoj de la universo. Por la makrokosmaj estuloj mem la antaŭe menciitaj radioj kaj ondoj estas ilia videbla universo kun ties detaloj kaj kreoprocesoj, estuloj kaj objektoj, kiaj neniel laŭ lokaj detaloj povus fariĝi percepteblaj por nefinevoluintaj terhomoj, antaŭ ol ili mem fariĝos loĝantoj en la planeda, suna kaj galaksia spiraloj.

Tiel la makrokosmaj partikloj kaj la malplena spaco de la universo respektive estas organismoj kaj konscio aŭ spirito de vivaj makroestuloj. Kiam ni rigardas supren al la steloj, ni do vidas etan regionon de loĝata mondo. Sed tiu mondo aperas laŭ tia giganta makrokosma formato rilate al nia propra vivo kaj sensokapablo, ke ni vidas ĝian solidan materion kiel partiklojn kaj malplenon. Kaj kompare kun ni tiu makromondo estas tiel giganta, ke tiu parteto de ĝi, kiun ni spertas pere de niaj fizikaj sensoj, simbole estas komparebla kun partikloj kaj malplena spaco en etfingro de organismo. Kompreneble makrokosmo por la pure materia scienco estas nesolvebla mistero kaj eterne restus tiel, se la scienco ne evoluus al esplorado ekster la fizika materio. Nur per kosma konscio la finevoluinta homo laŭ la bildo de Dio povas observi la tutecon de la universo, kiu estas la ĉioampleksa, ĉiospertanta, kreanta organismo kaj la ĉiopenetra konscio aŭ sankta spirito de la eterna Dio.

### 3. Mikrokosmaj partikloj kaj malpleno

Se ni turnas nian kosman rigardon alidirekten en la universon kaj anstataŭ rigardi supren al la steloj nun rigardas malsupren en la internon de la materio – kaj ne nur de tiu materio, el kiu

konsistas nia propra organismo, sed ankaŭ tiu, el kiu estas konstruita la naturo ĉirkaŭ ni kaj ĉiuj aperaĵoj de kreitaj fenomenoj en nia ĉirkaŭaĵo – do ankaŭ tie ni vidas luman stelmondon, kiu konsistas el partikloj kaj malplena spaco. Tiun mondon ni nomas mikrokosmo, kaj ĝi konsistas interalie el la mondoj de la ĉeloj, molekuloj, atomoj kaj la eĉ pli etaj partikloj. Kompare kun tiaj mikrokosmaj partikloj kaj malplena spaco ni aperas kiel makrokosmaj estuloj. Ĉiu por si, la multaj organoj de nia organismo estas sistemo de partikloj kaj malplena spaco. Ili estas laktovojaj sistemoj aŭ galaksioj en mikrokosmaj formatoj, rilate al kiuj la terhomaj organismoj estas en makrokosma formato. Laŭ tia perspektivo do nia organismo laŭprincipe estas komparebla kun la antaŭe menciita organismo en nia makrokosmo, kiu konsistas el diversaj kunordigitaj galaksisistemoj. Senkonsidere ĉu temas pri makrokosmo aŭ mikrokosmo, ni vidas, ke ĉie ni renkontas la principon partikloj kaj malplena spaco kaj eĉ en formo de vivuloj, kiuj estas universo aŭ materio unu por la alia.

Sed kiel tio rilatas al la propra senso- kaj perceptkapablo de la terhomo? – Escepte de makrokosmo ni ne perceptas la mondon ĉirkaŭ ni kiel partiklojn kaj malplenon. Ni spertas ĝin kiel vivulojn kaj objektojn, kiel ion, kion ni povas vidi, aŭdi, senti, flari kaj gustumi. Tiun mondon, kiun la homo perceptas per siaj fizikaj sensoj, mi nomas ”mezkosmo”. Ĝi ekzistas inter makrokosmo kaj mikrokosmo, kaj kompreneble ĝi konsistas el partikloj kaj malplena spaco, sed tia ĝi ne estas sensata kaj spertata. Ĉi tie Dio malkaŝas por ni, kion reale signifas la makro- kaj mikrokosmaj stelmondoj. Mezkosmo aperas por ni kiel vivuloj kaj objektoj, kiuj havas formon, koloron kaj volumenon. Ni vidas miriadojn da diversspecaj vivuloj, ni vidas solidajn, likvajn kaj gasajn materiojn, kaj ni vidas, ke ĉiuj tiuj fenomenoj estas subigitaj al transformiĝo, kio same estas kiel kreado. Ni vidas, ke en sia fina rezulto tiu kreado estas logika, kio alivorte signifas, ke ĝi estas ĝojo kaj beno por vivuloj. Estas tiu kreoproceso, kiu estigis nian organismon, niajn organojn kaj ĉiujn fenomenojn en nia ĉirkaŭaĵo. Sed kiu estas la estiganto de tiu kreado?

**4. Kreado manifestata de vivuloj**

En la terhoma mezkosma mondo la ĝenerala kompreno aŭ sperto estas, ke la teraj homoj kapablas krei. La homoj konstruas domojn, ŝipojn, aŭtomobilojn kaj aliajn teknikajn helpilojn, ili kreas artaĵojn kaj faras metian praktikan laboron, kio ankaŭ estas kreoprocesoj. Ĉu iuj el tiuj aferoj povus estiĝi sen la kreokapablo de homo aŭ vivulo? Ne, ili ne povus, komplete maleblus. Sed ekzistas ja multe pli da kreitaj aferoj ol tiuj, kiujn estigis la homoj, nome tiuj multaj aferoj, kiujn ni kune nomas ”la naturo”, kaj kiuj estas same logikaj kaj utilaj kiel la objektoj, kiujn kreis la homoj. Jes, ĉu ne eĉ estas tiel, ke en sennombraj kazoj la homoj lernis el la kreoprocesoj de la naturo por mem krei ion, kio povus esti profitdona aŭ utila? Surbaze de propraj spertoj devus esti nature por la homo agnoski la ekziston de kreanto kun kreokapablo malantaŭ kreitaj fenomenoj. Laŭ propraj spertoj ni scias, ke devas ekzisti kreanto malantaŭ ĉiuj kreitaj objektoj, sed kie troviĝas tiu kreanta viva ”io”, kiu devas ekzisti malantaŭ ĉiuj kreoprocesoj de la naturo? Ĉu iam ni vidis tiun ”ion”? Ne, absolute neniu viva estulo vidis tiun, ĉar ĝi estas levita super ĉia kreado, ĝi estas levita super ĉia materio kaj sekve ne estas alirebla por ia perceptado. Tiu ”io” povas fariĝi fakto nur pere de sia influo aŭ efiko al la materio, kio signifas pere de ĝia kreado. Nur pere de kreado kaj manifestado la kreanto manifestas sin, alivorte per la efikoj de sia kreokapablo. Nur la objektoj kreitaj en la materio

estas alirebla por rekta perceptado. Tio, kion ni vidas de la vivuloj, ne estas la vivuloj mem. Ne estas la direktanta ”io” de la vivulo, kiun ni perceptas, sed la efikojn en la materio, kiujn tiu ”io” kreis. La fizika organismo de homo ne estas tiu estulo mem, sed efiko de ĝia kreokapablo, kiu sekve estas elradiaĵo de la nevidebla ”io”, aŭ la nevidebla kreanto, kiun iom post iom la homaro ekkonos kiel la eternan ĉiean Dion. La ĉiea Dio kompreneble devas ĉeesti ankaŭ en la homo, jes, en la organoj, ĉeloj, molekuloj, atomoj ktp., kiel la sama Dio ĉeestas ĉie en la universo, en makro- kaj mikrokosmo. La tuta materia universo estas la fizika organismo de tiu Dio. Ĉiu vivulo en la universo estas organo aŭ ilo de Dio, pere de kio tiu sama Dio perceptas kaj manifestas sian kreoforton.

**5. La vivulo kaj la kosmaj principoj**

Ĉiu unuopa vivulo en la universo vivas kaj moviĝas kaj ekzistas en la eterna Dio, kaj tial ĉiuj vivuloj estas same proksimaj al Dio kaj ricevas same grandan amon kaj simpation de Dio. Sed ĉu la antaŭe priparolita makrokosma estulo ne havas pli grandan signifon ol la tera homo, kiu eble eĉ estas krimulo kaj dineanto? Ne, absolute ne, ĉar tiu ebla krimulo ja ankaŭ estas makroestulo rilate al tio, kio vivas kaj moviĝas kaj ekzistas en li. Ankaŭ li estas makroestulo rilate al mikrokosmo kaj havas saman signifon en la universo kiel tiu estulo, kiu estas tia makroestulo por la homoj. Se eble li aktuale estas krimulo kaj dineanto, tio nur estas portempa stadio en lia evoluo en la spiralciklo, kie ankaŭ li havos kosman konscion kaj fariĝos organo por la dia kreado kaj manifestado. Se momente li estas krima kaj negativa laŭ homa vidpunkto, la kaŭzo estas, ke li apartenas al tiu parto de la dia konscio, kiun mi nomas ”la duaranga konscio de Dio”, kie okazas la renoviĝo de la konscio kaj de la vivulo kaj de Dio. Kaj tiu ”duaranga konscio” troviĝas en ĉiu unuopa spiralciklo. Ankaŭ povas ekzisti galaksiestuloj aŭ aliaj makroestuloj, kiuj nun estas krimuloj kaj dineantoj en sia propra evoluspiralo survoje al la sperto de kosma konscio, post kio ankaŭ ili eniras en ”la unuarangan konscion de Dio”, same kiel la terhoma krimulo faros en sia evoluspiralo. En ĉiuj spiralcikloj troviĝas statoj de mallumo kaj lumo, kiujn vivuloj trairas survoje de la mallumo al lumo, kiu trairo estas bazita sur la realigo de la eterna kontrastprincipo de la universo, sen kiu neniu sperto aŭ kreado povas okazi. Kaj la percepto de grando estas bazita sur la eterna principo de perspektivo, kiu estas same necesa por la realiĝo de kreado kaj spertado. Ĉiu vivulo estas samtempe makro- kaj mikroestulo, kiu havas sian propran mezkosman perceptadon, kaj tiel laŭ kosma vido ĉiuj vivuloj estas same grandaj, kaj Dio estas al ili same proksima. Kvankam ekz. mil jaroj estas preskaŭ ne superrigardebla tempo por tera homo kaj nur mallonga tempo por galaksiestulo, do tamen validas, ke ”por Dio unu tago estas kiel mil jaroj kaj mil jaroj kiel unu tago”. Tiel ankaŭ unu sekundo estas por Dio kiel unu miliono da jaroj kaj unu miliono da jaroj kiel unu sekundo.

Nature povas esti malfacile kompreni tion per terhoma konscio, sed temas pri scio, kiun oni propragas al si iom post iom. Hodiaŭ jam multaj kaj en estonta tempo eĉ pli da homoj sopiras pri superrigardo super la universalaj fenomenoj, ne nur laŭ fizika, sed ankaŭ laŭ spirita perspektivo. Fariĝis mia tasko doni tiun kosman superrigardon, pere de kiu la serĉanta homo povas alpropragi al si tiun teorian scion pri la kosmaj leĝoj kaj principoj por uzo en praktika pensado kaj agado. Estas tre grave por la plua evoluo de la tuta homaro, ke pli kaj pli da homoj konsciu, ke la krea pensoforto de Dio vibras kaj radias tra la tielnomatan malplenan spacon en makro-, mez- kaj mikrokosmo, kaj ke ili povas

fariĝi ricevantoj de tiu forto, ne kiel blindaj mediumoj, sed pere de impulsoj, ideoj kaj inspiro. Oceano da geniaj ideoj ĉirkaŭas la homojn kaj enradias ilian konscion, kiam ili atingas la saman ondolongon kiel la bazan tonon de la universo, kiu same estas kiel esti utilo kaj beno por vivuloj, kaj kiu laŭ malnova religia termino estas nomita ”la sankta spirito”.

Ĉiuj vivuloj, kiuj surbaze de la spiralcikla principo kaj la perspektiva principo konsistigas kaj universojn kaj materiojn unu por la alia, troviĝas en sia respektiva spiralciklo aŭ en mallumo survoje al la lumo aŭ en la lumo. Kiam tiu lumoperceptado fariĝas tia kutimkonscio, ke la vivuloj preskaŭ riskas fariĝi robotoj, ili aŭtomate iras en pli altan spiralciklon, kies malluma parto tiam fariĝos ”lumo” por ili. Tiel ili trairas la duarangan konscion de Dio, kie okazas renoviĝo de ilia konscio. Poste en la nova kaj laŭperspektive pli alta spiralo ili denove kapablas sperti la lumelvolvon en la unuaranga konscio de Dio kiel manifestadon de saĝo kaj amo en tia mezuro, kia estas la plenumo de iliaj plej sinceraj deziroj kaj sopiroj.

### 6. La malplena spaco kaj la nevideblo

La partikloj de la universo, senkonsidere ĉu ili reprezentas al ni makro- aŭ mikrokosmon, reprezentas la kreitan parton de la universo, kio estas efikoj de nevidebla kreanto. Kaj la nevidebla estas la tielnomata malplena spaco. Tiu ĉi nevidebla kreanto estas do reprezentebla nur per la malplena spaco inter la partikloj, sed tial la malplena spaco tute ne estas malpleno. Ĉi tie troviĝas la mioj de ĉiuj vivuloj, kiuj kune konsistigas la mion de Dio, ĉar la mioj estas nedisigeblaj. En la malplena spaco troviĝas la konscio aŭ la menso de Dio, ĉi tie ekzistas la eterna superkonscio kiel la kosmaj mondoj kaj la tielnomata sankta spirito. La malplena spaco inter la partikloj do estas plenigita de la menso de Dio konsistanta el la menso de la unuopaj vivuloj. De tiu nevidebla mondo pere de ilia superkonscio la mioj de la vivuloj direktas siajn organismojn kaj la ĉiutagan konduton. Kaj de tiu nevidebla mondo la planedoj, sunoj kaj galaksioj de la tuta universo estas direktataj. Ĉi tie ni atestas la menson de Dio, kiu gvidas la iradon de la mondoj en la eterna senfina universo. Kion ni do povas lerni el tio? Kion Dio ĉi tie malkaŝas al ni? – Ĉi tie malkaŝiĝas al ni, kiel la tuta universo estas gvidata de menso kaj pensoforto, kiuj kune kun la mio de Dio formas la nevideblan parton de la universo, dum la partikloj formas la fizikan korpon de Dio. Ĉar ankaŭ ni mem reprezentas nevideblan mion kaj nevideblan menson, do viditaj de la fizika mondo nia konscio kaj nia mio same fariĝas la malplena spaco, dum nia organismo konsistas el la partikloj. Ni estas ”laŭ la bildo de Dio”, ĉar ankaŭ ni reprezentas la bazan principon de la universo: partiklojn kaj malplenan spacon.

### 7. Nia propra mio kaj ĝia galaksisistemoj

Se ni volas lerni pli pri nia propra organismo, ol ni povas percepti per niaj fizikaj sensoj, ni esploru makrokosmon, kiu reprezentas la samon kiel nin mem, sed laŭ pli granda perspektivo, aŭ ni esploru mikrokosmon, kie ni renkontas malpli grandan perspektivon. Sed la leĝoj kaj principoj estas la samaj. Se ni deziras vere kompreni tion, kion ni vidas kiel planedojn kaj galaksiojn, ni esploru la homan organismon. Esplorante kaj makro-, mez- kaj mikrokosmon la homo fakte povas akiri grandan scion pri la vivo kaj ĝiaj leĝoj, kio povas havi grandan signifon en la ĉiutaga vivo.

Nia organismo konsistas el serio da diversaj organoj. Ĝi havas cerbon, koron, renojn, pulmojn, stomakon, glandojn ktp. Ni vidas tiujn organojn kiel solidajn

materiojn, sed laŭ sia plej profunda kosma analizo ili estas partikloj kaj malplena spaco. Tio alivorte signifas, ke ili estas sunoj kaj galaksisistemoj, kio plue laŭ la antaŭe prezentitaj analizoj signifas, ke ili estas vivuloj, kie la nevideblaj mio kaj konscio reprezentas la malplenon kaj la organismo la partiklojn. Kiam temas pri la tuta universo, kiun ni vidas kiel la ĉielajn stelojn, estas tia diferenco, ke ĝi estas tiel giganta rilate al nia sensokapablo, ke ni nur vidas tre, tre etan lokan parton de tiu grandega sistemo. Tial ni ne povas kompreni, kion ni vidas, kiam ni uzas nur la fizikan sensokapablon. Tial la universo kun siaj partikloj kaj malplena spaco restas nesolvebla enigmo por la fizika scienco, malgraŭ ĉia progesinta tekniko. Sed ne estas la intenco de la vivo, ke ĝi restu mistero. Tial en la dia mondordo estas tiel saĝe aranĝite, ke tion, kion oni ne povas vidi en makrokosmo aŭ en la grando, oni povas vidi en mikrokosmo aŭ la malgrando. Inverse, tion, kion oni ne povas vidi en mikrokosmo, oni povas vidi en makrokosmo. Kaj fine, tion, kion oni ne povas sperti nek en makrokosmo nek en mikrokosmo, oni per siaj fizikaj sensoj povas sperti rilate al mezkosmo kaj ties vivuloj. Tial, observante mikrokosmon en sia propra fizika organismo la kosma esploranto ne havas aliron nur al la malkaŝo aŭ la solvo de la luma nokta stelmistero aŭ makrokosmo, sed ankaŭ povas atesti sian identecon kiel la suverenan reganton en propra stela sistemo konsistante el pluraj galaksisistemoj. La kosma esploranto komprenas, ke lia organismo estas universo, tute trapenetrata de lia spirito, kio signifas de lia konscio kaj pensoforto. La kosma esploranto komprenas, ke lia organismo konsistas el partikloj kaj malplena spaco, ke la partikloj formas galaksisistemojn, kiujn de lia mezkosma vidpunkto li vidas kiel organojn. Grupo da partikloj formas lian koron, alia formas la pulmsistemon ktp. Ĉiu organo estas sistemo en kunlaborado kaj interagado kun la aliaj sistemoj en tiu tuto, kiu estas la organisma universo. Ĉiuj galaksisistemoj estas gvidataj kaj direktataj de nia konscio parte aŭtomate kaj parte laŭvole. La partikloj estas direktataj de la malplena spaco, kiu estas trafluata de nia spirito kaj pensoforto, kiuj plue estas direktataj de niaj deziroj kaj avidoj. Tiuj deziroj kaj avidoj aperas kiel mikroelektraj fortoj kaj aktiviĝas de nia superkonscio tra la subkonscio al nia tagokonscio. Tra nia cerbo, kiu estas speciale konstruita galaksisistemo, nia konsci- aŭ mikroelektra forto estas kondukata al nia nervogalaksio, kie la konsciforto magnetigas la sangon, kiu estas kondukata al ĉiuj ceteraj galaksisistemoj kun iliaj partikloj kaj malplena spaco. En nia fizika organismo, kiu estas la universo de la mio, la cerba galaksio estas la plej evoluinta sistemo, ĉar ĝi estas la organo por transigo de nia konscio kaj volo al la organismo kaj la organo por transigo de vico da pensobildoj kreitaj per fizikaj spertoj reen al nia sub- kaj superkonscio, kiu ekzistas en la nevidebla mondo aŭ la tielnomata malplena spaco.

**8. Pensforto, malsano kaj sano**

Kion ni do povas kompreni per tio? – Ni komprenas, ke per nia tuta pensofunkcio ni subtenas la sanon kaj bonfarton de niaj organoj kaj tuta organismo. Male ni ankaŭ povas kaŭzi malsanon kaj ruiniĝon, eble kompletan detruon de certaj organoj, eble de la tuta organismo. Per cerbo kaj nervosistemo nia pensoforto tra la sango penetras kaj magnetigas ĉiujn niajn organojn, kio kompreneble signifas, ke ĝi penetras la organgalaksiojn, kies malplena spaco kaj partikloj estas influitaj de tio. Kaj same kiel nia pensoforto povas esti vivigaj kaj stimulaj impulsoj, ĝi povas esti ankaŭ el tiel negativa speco, ke ĝi kaŭzas malordon kaj eĉ katastrofojn en niaj organgalaksioj. Se homo kapablas vivi en la pensoforto de la

ĉioamo, ĝi efikas fortige kaj sanprogresige al ĉiuj laktaj vojoj aŭ galaksisistemoj en la organismo. Homo kun tia pensado ne povas ricevi mensan malsanon kaj ankaŭ pro siaj pensoj estas tre protektita kontraŭ fizikaj malsanoj. Sen tiu protektado estas tiaj homoj, kies konscio estas, kion ni nomas malluma, t.e. plena de kolero, malamo, ĵaluzo, amaro kaj iriteco, ĉar ili plenigas la malplenan spacon en siaj organgalaksioj laŭ tre negativa maniero, kio ankaŭ validas, kvankvam en aliaj varioj, kie temas pri tiu forto de malluma konscio, kiun ni konas kiel malĝojon, timon, deprimon kaj streson. Mallumaj pensospecoj kaŭzas malordon en niaj organgalaksioj, el kiuj ĉiu unuopa sistemo havas proprajn partiklojn, kiuj tute ne eltenas kontakton kun partikloj de aliaj galaksioj. Estiĝas eksplodoj kaj mondkatastrofoj en la galaksisistemoj de nia universo, en unu aŭ pluraj laŭ la naturo de la pensoj. Tial certaj partikloj estas ĵetitaj en regionojn, al kiuj ili ne apartenas. Laŭ sia mezkosma perspektivo la estiganto de la organismo spertas la efikon eble kiel ekzemon, inflamojn aŭ vundojn. Se homo spertas tro grandan nervostreĉon kun malesperiĝoj kaj ĉagrenoj, tiam pulmgalaksiaj sentopartikloj penetras en la stomakan galaksion, kaj stomaka ulcero estiĝas. Se partikloj de la stomaka galaksio penetras en la pulman galaksion, pulma inflamo aŭ alia pulma malsano estiĝas. Se partikloj de la pulma galaksio penetras en la cerban galaksion aŭ en alian galaksion de la organismo, ili povas kaŭzi kancerajn tumorojn en tiuj regionoj. Se samtempe alvenas ankaŭ partikloj de la stomaka galaksio la tumoroj povas fariĝi tre detruaj kaj kaŭzi la morton. La enpenetro de erarvagaj partikloj en galaksion, al kiu ili ne apartenas, estas la kaŭzo de ĉiuj malsanoj en la organismo, kaj tial oni povas konkludi, ke malsanoj estas el astronomia naturo. Ili estas mondkatastrofoj en mikrokosmo.

**9. La terhomo survojas al vivo en lumo**

Ia ekstera influo ankaŭ povas esti la kaŭzo de tiu erarvagado de partikloj aŭ mikrosunoj de la galaksioj. Se homa organismo akcidente leziĝas estigante rompojn, vundojn kaj kontuzojn, ankaŭ tio aperas kiel mondkatastrofoj en la galaksisistemoj de la aktuala organismo. La homo spertas la akcidenton kiel karmon, kiel sortoondon, kiu revenas. Kompreneble tio samtempe ankaŭ estas ero en la sorto de la mikroestuloj, alie la vivo estus maljusta kaj sensenca. La sortoformiĝo estas tute preciza, ankaŭ kiam temas pri la rilato inter makroestulo kaj mikroestuloj. Sekve absolute ne estas hazarde, ke la homoj vivas en la organismo de la terglobulo. La kaŭzo estas, ke la sortoformiĝo de tiu makroestulo, kiu en sia aktuala enkarniĝo travivos ”la grandan naskiĝon” kaj akiros kosman konscion, kongruas kun la terhoma evoluŝtupo en la bezonata tempoperspektivo, en kiu 3.000 jaroj por la terhomoj estas nur momento por la terglobulo.

La terhomoj do vere survojas al vivo en lumo, tamen ne laŭ diktaturo fare de pli alte evoluintaj estuloj aŭ laŭ mirakloj, sed nur per siaj propraj volo, deziroj kaj sopiroj ili estas survoje al konformiĝo kun la luma pensoforto de la terglobulo, malantaŭ kiu troviĝas lumaj pensoimpulsoj de la sunsistema estulo, de la galaksisistemaj estuloj ktp., kio ĉio signifas la lumajn amimpulsojn, kiuj elradias de la eterna Dio, en kiu ni vivas, moviĝas kaj ekzistas. La homo devas labori por evoluigi sian talenton pri plenumo de la amordono, kaj tiam tiu amrealigo radios kiel vivigaj fortoj en tiu universo, kiu estas la fizika korpo de la koncerna homo, kaj kiel humaneco kaj ĉioamo ĝi elradios ĉiutage al la proksimulo.

*La manuskripto de tiu prelego de Martinus en Klint, la 22.07.1968, estas prilaborita de Mogens Møller kaj aprobita de Martinus. El dana originalo “Partikler, tomrum og tankekraft”, dana Kosmos n-ro 11, 1982.*

*Traduko de Ole Therkelsen en 2012.*



# Enkonduko al La Eterna Mondbildo, libro 5

de Martinus

**La homa organismo estas galaksia sistemo konsistanta el ses universoj**
La simboloj alcelas esti materialo, per kiu oni povas montri, ke ĉiuj malsanoj estas fuŝkontaktoj en la pensmondo. La pensmondo estas kombino de elektraj, magnetaj fortoj, kiuj plenigas la malplenan spacon inter la fizikaj partikloj, el kiuj konsistas nia organismo. Ĉi tiun penskombinon ni spertas kiel nian konscion. Per niaj deziroj, avido kaj volo ni povas teni tiun je kompleta kontakto, kio signifas: libera de fuŝkontaktoj, parte ene de la organismo, kaj parte ekstere en la rilato al la organismoj de aliaj vivaj estuloj. Kaj tiam tute ne povas aperi tiuj fuŝkontaktoj, kiuj estas la absolute plej interna kaŭzo de ĉiuj malsanoj. Estas tiu privilegio, kiun havas la homo kiu estas tute perfekta laŭ la bildo de Dio, kiam ĝi troviĝas en sia propra mondo, kio signifas: en la tute perfekta homregno.

Sed la homo ankaŭ povas per siaj avido, deziroj kaj volo krei oceanon da fuŝkontaktoj en la malplena spaco inter la partikloj, globoj kaj mondoj de la organismo, kaj tiel krei mondkatastrofojn en sia propra universo (nome sia fizika korpo). La estiganto de la organismo spertas ĉi tiujn fuŝkontaktojn kiel malsanojn. Estas de tiuj ĉi malsanoj la neperfekta homo suferas. Pro tio ne ekzistas eĉ unu malsano, kiu konsistigas escepton de tio. Laŭ tiu fakto ni vidos ĉi tie, ke la homo kun siaj avido, pensoj kaj volo povas atingi eblon kontroli la partiklojn de la organismo, kaj tiel teni la organismon libera de fuŝkontaktoj, kio signifas malsanojn. Fuŝkontaktoj estiĝas ĉefe pro malamo kaj koleremo, kaj la sekva ĉenreago, kiun tio povas kaŭzi ĉe aliaj estuloj, estas milito, mortigo, turmento kaj korpodifektiĝo aŭ ĉiu formo de persekuto kaj venĝago. La kompleta sano je korpo kaj animo nur povas ekzisti en formo de la normalaj vivĝojo, paco kaj feliĉo. Tie, kie tiu ĉi vivspertostato ne troviĝas, jam estas fuŝkontaktoj en la elektra aŭ spirita sistemo de la estulo. Pro tio, tio ĉi ne povas eviti ruinigi la normalan staton inter la partikloj kaj tie krei fuŝkontaktojn, kiuj eksplodigas la partiklojn. Tio plue signifas malsanojn, vundojn kaj suferojn en la organsimo. Tiuj ĉi partikloj principe estas planedoj, sunoj kaj galaksioj, kaj tiel universoj por la mikroformoj, por la mikroviva elvolviĝo, kiu konsistigas la fundamenton por la kompleta sano kaj konserviĝo de nia organismo kaj la lumefiko en la animvivo, kiun donas korpa sento de bonfarto.

La homoj povos per ĉi tiuj kosmaj analizoj, kiam mi estos fininta la simbolmaterialon por tio kaj ankaŭ estos kreinta kompletan tekston por la analizoj, atingi vidi, kiel ĉi tiu pensosfero efektive estas tute decida por ilia korpa sano. Iĝi tute reganta la elvolviĝon de sia pensosfero estos la samo kiel

esti plena reganto de la kuraco de siaj malsanoj aŭ la plena evito de la apero de malsanoj en la organismo. Esti tiel dieca reganto de sia universkombino kaj tiel de la kreo de sia normala vivĝojo, estas la samo kiel esti en la esprimata bildo de Dio laŭ lia simili.

*Manuskripto de Martinus por simbol-prelego la 11.07.1961. El dana originalo "Indledning", Det Evige Verdensbillede, bog 5.*

*Traduko Mathias Dalmose en 2012.*

1. La instinktuniverso. – La muskolaro. (La planta regno de la organsimo)
2. La pezuniverso. – Stomako- kaj digestregiono. (La besta regno de la organsimo)
3. La sentuniverso. – Koro- kaj pulmosistemo. (La homa regno de la organismo)
4. La inteligentuniverso. – La cerbregiono. (La saĝa regno de la organismo)
5. La intuiciuniverso. – La plej alta fajro aŭ la seksregiono. (La dia mondo de la organismo)
6. La memoruniverso. – La skeleto- aŭ mineralregiono. (La beata regno de la organismo)



© Martinus Institut 1981 Reg. 46

Simbolo n-ro 46 *La atoma mondo de la homo kaj la bazenergioj*

**La homa korpo kiel stelsistemo**
**Simbolo n-ro 45**

**45.1** Lige al ĉi tiu simbolo ni faru pens-eksperimenton imagi homon, kiu estas grandigita tiel, ke ĝi tute plenigas nian ĉielon tiom foren en la kosmo, kiom ni entute povas rigardi. Tie ni ne vidus homon, sed de certa vidpunkto ni vidus ĉi tiun bildon. Ni vidus stelsistemon, homan formon tie fore, sed ĝi konsistus el sunsistemoj, pli malpli dense situantaj, laŭ la strukturoj, kiujn ili formas en la organismo. Povas ja ŝajni strange ke la figuro kuŝas horizontale, kaj ke ni ne povas vidi moviĝon. Sed, ĉar ĝi estas tiom grandigita, ni devas memori, ke sekundoj de makrokosma estulo por ni egalas al jarcentoj aŭ jarmiloj. Niaj vivoj do estas tiel malgrandegaj, ke ni kompare kun tiu bildo povas vidi neniun moviĝon. Kompare kun la malgranda terohoma vivo, kiun ni havas, la distancoj estas tiel grandaj, ke ni ne povas vidi tiun malmulton da moviĝo, kiu okazas. Tial la vidaĵo ŝajnas senmoviĝa, kiel la grandaj stelsistemoj foraj en la kosmo. Eĉ grandegaj spiraloj, kiuj turniĝas, ŝajnas senmoviĝaj. Tiel longe kiel la homoj ilin vidas, ili ŝajne ne moviĝis, kvankam ili vaste moviĝas. Estas ĉar la homoj estas tiel malgrandaj kompare kun tiuj grandegaj regionoj. Je tiu perspektivo la moviĝo, kiu povas okazi dum terhoma vivo, estas tiel malgranda ke la homoj ne povas vidi ĝin. Kaj tiel ni vidus homon kiel stelsistemon fore en la kosmo.

Nun oni eble opinias, ke ĉi ĉio estas fantaziaĵo, sed ne estas. Estas vera fakto, ke la homo tiel aspektas rigardata el mikrokosmo. Ĉar ni ekhavis cerbon, intelekton kaj kapablon pense povi krei ĉion ajn, estas senprobleme fari tiun ĉi penseksperimenton. Estas io, kion ni faru. Ni devas trejni supren- kaj malsupreniri en makrokosmon kaj mikrokosmon per la intelekto, kiun ni havas. Ni ja konas la homan organismon, ĉar ni estas la vivo en ĝi. Nia konscio estas en la organismo, ĝi estas en la malplena spaco inter la partikloj. Tamen, la partikloj en la figuro estas verŝajne pli densaj ol la veraj, sed tio estas ja nur simbole montrita.

---

**La atoma mondo de la homo kaj la bazenergioj**
**Simbolo n-ro 46**

**46.1** La simbolo montras la mikrouniverson de la homo, kiu estas grandigita al giganta formo kiel tuta stelĉielo. Ni vidas, ke tia stelsistemo ne nur estas malluma spaco kun kelkaj lumaj sunoj. La bazenergioj estas la elektraj fortoj en la malplena spaco inter la sunoj. Ni tiel vidas galaksiajn sistemojn en formo de la cerba sistemo (verda koloro) kaj la koro-, pulmo- kaj sangosistemoj (flava koloro), la digestsistemo (oranĝa koloro), la intuicisistemo (blua koloro), la memorsistemo aŭ la skeleto (indiga koloro) kaj la instinktosistemo (ruĝa koloro).

De tio ni povas lerni kompreni tion, kion ni vidas en la kosmo, ĉar, tra la reagoj de tiuj ĉi stelsistemoj, ni vere povas komenci kompreni kiujn partojn de organismo ni tie ĉi priatestas. Iom post iom laŭ la ekkono de nia propra interno, ni povas komenci trovi la samon fore en la universo. Cetere ni povas lerni percepti nian propran internon kiel universon, laŭ la bone konata noktoĉielo, kiun ni vidas kiel universon kun malluma spaco kaj lumaj sunoj.

Ĉar estas konscio malantaŭ nia propra universo, ankaŭ devas esti konscio malantaŭ la granda universo.

*Martinus, prelego la 01.12.1955.*

*Traduko Mathias Dalmose en 2012*

# Du fruaj danaj pioniroj de Esperanto




de Mogens Groth Jørgensen kaj Mogens Rude Andersen

**1. Christian Nielsen (Vejbæk)**
Dum la 1880-aj jaroj multaj homoj, precipe en la okcidenta parto de Eŭropo, laboris por Volapuko. Inter ili estis Christian Nielsen (Vejbæk) el Flensburgo (1827-1896). Sed post 18-monata okupiĝo pri la "mondlingvo" de Johann Martin Schleyer (1831-1912) venis – eble hazarde – en liajn manojn lernolibro de la Lingvo Internacia de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Christian Nielsen decidis kompari ĝin kun tiu de Volapuko, kaj li estis ravita. Frapis lin la simpla gramatiko de Esperanto, ĝiaj multaj internaciaj elementoj, la facila lerneblo de la lingvo. Dum nur 6-7 semajnoj li faris pli grandajn progresojn en la lernado de Esperanto, ol li atingis pri Volapuko en la daŭro de 18 monatoj. La rezulto estis, ke li baldaŭ forlasis la lingvon de Schleyer por anstataŭe dediĉi sian tempon, sian energion, por la Internacia Lingvo. En *Adresaro de Esperantistoj* – unua serio el oktobro 1889 – estas laŭ alfabeta ordo registritaj entute 1.000 personoj; sub n-ro 640 ni trovas jenan nomon: Christian Nielsen, Flensburgo. Li havis leteran kontakton kun D-ro Zamenhof, kiu instige admonis lin fari lernolibron por danoj. Tion Christian Nielsen tuj akceptis kaj kiel bazon uzis germanan Esperanto-lernolibron. En novembro 1889 li finis la laboron kaj povis transdoni la manuskripton al la Flensburga presejo J.B. Meyer. La 11-an de januaro 1890 Christian Nielsen havis anoncon en Flensborg Avis, kaj aliloke de la gazeto ankaŭ artikolon pri la Internacia Lingvo. Supozeble la unua dana lernolibro de Esperanto aperis en la sama monato. Jen ĝia enhavo:

*Antaŭparolo*

*Gramatiko: Enkonduko – La literoj – Vortfarado – Pronomoj – La frazo*

*Vortaro internacia-dana kaj dana-internacia*

*Ekzercaro*

*Listo de la verkoj pri kaj en Esperanto aperintaj ĝis 1890*



Min Lærebog
til det internationale Esperantosprog vil i heftet Tilstand blive færdig i denne Maaned og tilbydes hermed. Den er over 4½ Ark stor og koster 50 Penning eller 45 Øre. Handlende paa Landet og Boghandlere i Byerne faa 20 pCt. Rabat og fri Tilsendelse, naar der tages mindst 10 Eksemplarer, Ombæringspenge undtagne. Hvad der væsentlig ubeskadiget tilbagesendes frankeret i 14 Dage efter Modtagelsen er ikke at betale.
Flensborg, Duborggade 15.
Christian Nielsen.

*Anonco pri la unua dana Esperanto-libro*

Ni scias, ke dum la unuaj du monatoj post la apero de la lernolibro estis venditaj almenaŭ kvindek ekzempleroj.

Sed kiu estis tiu Christian Nielsen? La grava verko *Enciklopedio de Esperanto* (1933-1934) enhavas pri li nur unu frazon; same estas en la studlibro *Progresu* de Lorenz Friis (3-a eldono, 1954); ĝi dediĉas eĉ kvin lecionojn al la historio de la dana Esperanto-movado.


Ekde la 1960-aj jaroj Mogens Groth Jørgensen (1913-2010) uzis multe da tempo por trovi informojn pri la verkinto kaj lia lernolibro kaj tiurilate havis kontakton kun tre multaj instancoj kaj personoj. Post sia blindiĝo mia nomfrato transdonis la ampleksan kolektitan materialon al mi por plua esplorado. Laŭ lia deziro ĝi poste estos deponita en la regiona arkivejo en Haderslev.

Christian Nielsen naskiĝis en 1827 en Gåskjær, vilaĝo proksimume 15 km sudokcidente de Åbenrå. Li estis tre inteligenta knabo kaj havis nur 16 jarojn, kiam li instruadis private kaj samtempe preparis sin por studado ĉe la Seminario de Jelling. Post la fina ekzameno tie en 1850 li praktikis diversloke kiel instruisto. Ne plaĉis al la aŭtoritatoj, ke li ne volis baptigi sian filinon. Pro religiaj kaŭzoj li rezignis en 1857 sian lernejan karieron kaj tiam aĉetis bienon en Vejbæk – meze inter Tinglev kaj Kruså, proksime al la nuna landlimo inter Danlando kaj Germanio. Tuj post la amara milito en 1864 kontraŭ Prusio kaj Aŭstrio multaj ŝlesviganoj – inter ili Christian Nielsen – pugnigis la manojn por labori por la dana afero. Multnombraj estas la kampoj de lia agado: bibliotekoj, legorondoj, popola klerigado. En 1866 li fariĝis prezidanto de la nova Unuiĝo de Kamparanoj por Flensburgo kaj Ĉirkaŭaĵo – li fakte estis la iniciatinto – kaj ĝin zorge gvidis dum 30 jaroj. Lerta kaj ŝatata konsilanto pri agrikulturaj kaj laktejaj aferoj, pri financaj kaj juraj demandoj. Christian Nielsen havis ampleksan scion pri historiaj kaj impostaj aferoj kaj gajnis plurajn procesojn kontraŭ la prusa registaro kun sekvoj por la tuta regiono. Li aranĝis multajn kunvenojn – ankaŭ grandajn



*Christian Nielsen, ĉirkaŭ 1890*

– por la dansimpatiantoj kaj diligente kontribuis per artikoloj en Flensborg Avis; kiam ties redaktoro dum mal-longa periodo estis en germana mal-liberejo, Christian Nielsen transprenis lian funkcion, ktp. En 1869 oni kolektis en Ŝlesvigo subskribojn por sinturno al la prusa reĝo – Vilhelmo I – kun peto de plebiscito en Norda Ŝlesvigo pri reunuiĝo kun Danlando – laŭ § 5 de la packontrakto post la prusa-aŭstria milito en 1866. Christian Nielsen (Vejbæk) partoprenis en prepara kunveno pri tiu afero; tio kostis al li monpunon.



Lærebog

til det

internationale

Esperantosprog

(lingvo internacia)

af

Christian Nielsen.

Koster 50 Pg. = 45 Øre.

Flensborg.
Trykt af J. B. Meyer.
1890.

*La titolpaĝo de la unua dana lernolibro de Esperanto*

La flensburganoj deziris, ke li estu la gvidanto de la delegacio ironta al Berlino, sed malebligis tion liaj religiaj vidpunktoj. En 1876 li vendis sian bienon en Vejbæk kaj transloĝiĝis al la grandbieno Kielseng por ĝin administri por sia fratino, vidvino post kancelariestro Hans Petersen-Schmidt. Kiam mortis la fratino, li heredis Kielseng, sed baldaŭ vendis ĝin kaj ekloĝis en Flensburgo. En 1891 li fondis Flensburger Volksbank kaj estis ties direktoro ĝis sia forpaso kvin jarojn poste. Verdire, Christian Nielsen (Vejbæk) estis persono rimarkinda, vasthorizonta.

Lige al siaj multjaraj esploroj pri tiu diligenta ŝlesvigano Mogens Groth havis kontakton i.a. kun ties nepo, Christian Petersen, Odense. Li povis informi, ke post la morto de lia avo en junio 1896 oni forbruligis la restantan stokon de la 71-paĝa Esperanto-lernolibro; tial ĝi hodiaŭ estas granda raraĵo. En unu el tiuj malmultaj ekzempleroj oni trovas sur la lasta paĝo manskribitan noton, ke pli detalaj informoj pri Esperanto estas akireblaj ĉe redaktoro Toksvig en Nykøbing Sjælland. – Sed kiu estas tiu sinjoro?

**2. P.K. Toksvig**

Lia origina nomo estis Peder Christensen. Li naskiĝis la 1-an de majo 1851 en Barslund, malgranda vilaĝo en la okcidenta parto de Jutlando. En telefona interparolo aŭtune 2007 Lars Toksvig, Gilleleje, informis al mi, ke la aŭtoritatoj komence de la 1890-aj jaroj donis al lia avo la permeson uzi Toksvig kiel familian nomon. Post sukcesaj studoj ĉe la Seminario de Jelling li praktikis dum pluraj jaroj kiel instruisto ĉe diversaj lernejoj. Sed en majo 1881 Peder Christensen ŝanĝis karieron kaj fariĝis redakcia sekretario ĉe la gazeto Sorø Folketidende; kun redaktoro Martin li fondis en januaro 1883 lokan popolan altlernejon: Sorø Højskole. Ĝis decembro 1892 Toksvig deĵoris ĉe diversaj gazetoj en la nordokcidenta parto de Selando. Tiam li fondis Nykjøbing Venstreblad kaj ĝin redaktis dum 8½ jaroj. En julio 1901 anstataŭigis tiun gazeton Holbæk Amts Socialdemokrat, kun Toksvig kiel redaktoro.

En februaro 1964 Mogens Groth skribis al Signe Toksvig (1891-1983) por peti informojn pri ŝiaj gepatroj, Peder Kristian kaj Marie Toksvig. La leteron la konata verkistino transdonis al sia frato, Frithjof, kiu tiutempe estis ellaboranta biografion pri la interesa vivo de la gepatroj. La manuskripto de la unua parto – ĝis ĉ. 1880 – jam estis preta; restis materialo por supozeble du kromaj volumoj. La verko tamen neniam estis eldonita.

Peder Kristian Toksvig estis homo de brila intelekto, tre progresema, sur multaj kampoj antaŭ sia tempo. En la 1960-aj jaroj Mogens Groth havis la okazon tralegi du jarkolektojn de Nykjøbing Venstreblad. Lia impreso de la redaktoro: homo eksterordinara, kun noblaj idealoj pri demokratio, justeco ktp.

Inter la paperoj postlasitaj de Peder Kristian Toksvig la filo Frithjof trovis kopion de letero verŝajne skribita en 1924. En Esperanta traduko (MRA) ĝi tekstas:

*Eble povas vin interesi, ke mi estas la unua redaktoro en Danlando, kiu uzadis 'Esperanton' en la pratika ĵurnalismo, ricevante por mia gazeto Nykjøbing Venstreblad en Nykjøbing Sjælland, Danlando, korespondaĵojn en tiu lingvo el Ruslando kaj Bulgario. Mi ilin tradukis en la danan lingvon kaj publikigis en la gazeto. Tio okazis antaŭ nun ĉ. 30 jaroj.*

*Mi estis krome la unua persono, kiu fondis Esperanto-societon (en la menciita urbo). Tio okazis longe antaŭ ol oni ekkomprenis en Kopenhago la signifon de Esperanto.*

En la gazeto Lingvo Internacia, n-ro 3/1897, ni trovas jenon:

*Unu tagon, starante en ia librejo tie ĉi en la urbo kaj rigardante la elirintajn librojn, mi okaze trovis la Jarlibron de la Dana Turisma Societo por 1897. Mi foliumis en ĝi – kion mi vidas – "Esperanto kiel turista lingvo, libere prilaborita laŭ Valdemar Langlet". Kio ĝi estas? Esperanto kia do lingvo estas – tion mi volus vidi! Mi legis la artikolon kun plej granda intereso. Jen estas ĝuste lingvo por redaktoro mi pensis, tiun mi devas lerni. Pensita – farita, kaj jen mi estas fervora esperantisto.*

Tiel skribas P.K. Toksvig, la 46-jara redaktoro de la gazeto Nykjøbing Venstreblad, kaj li daŭrigas:

*Min tuj frapis, ke tiu internacia lingvo devas esti uzebla, kun granda utilo, en la servo de la ĵurnalismo kaj samtempe por la popola instruado. Unu el niaj poetoj en Danujo – M. Goldschmidt – diris la verajn vortojn: "Kiam oni nutras la animon per vero kaj justo, kreskas ĉe*

*ĝi flugiloj." Milionoj da homoj ricevas parton de ilia [sia] spirita nutraĵo per la gazetaro kaj tial estas la devo de ĉiu gazetisto meti sur la ĵurnalismon la plej eble puran stampon de vero kaj justo. Erari estas homa, kaj neniu estas certa por ne juĝi malĝuste, sed neniu 'gentleman' rifuzos migri la vojojn, kiuj kondukas al la plej bona kompreno de la vivo kaj pensado de la kunhomoj. Ŝajnas al mi, ke Esperanto estas unu el tiuj vojoj.*



**Renkonto.**

Ciuj amikoj de la lingvo internacia esti invita renkonti ce sinjoro redaktoro Toksvig jaudo la 29 an Aprilo 1897 vespero 8 h.

*Anonco en Nykjøbing Venstreblad pri la fonda kunveno de Societo Esperantista de Danujo*

En Nykjøbing Venstreblad de la 21-a de aprilo 1897 estis anonco kun invito al kunveno por esperantistoj 8 tagojn poste. Pri ĝi aperis en la junia-julia numero 1897 de Lingvo Internacia jeno:

*Letero el Danujo*
*Nykjøbing 10.V.1897*

*Kvankam ni nur estas malgranda rondeto, ni tamen pro la bono de nia afero fondis societon, kiun ni kuraĝis nomi 'Societo Esperantista de Danujo', supozante, ke el la malgranda klubo en Nykjøbing (kaj ĉirkaŭaĵo) elkreskos alia pli granda, por la tuta lando, kiel elkreskas la arbo el ĝermanta semo. La societo estas fondita ĉe mi, en mia kontoro la 29-an de aprilo 1897; estron [!] oni elektis min. …*

En tiu letero – skribita de redaktoro Toksvig – estas ankaŭ mencio, ke la ĵus fondita societo denove kunvenis en lia hejmo la 9-an de majo.

*Ĉar ni ĉiuj estas komencantoj en Esperanto, ni uzadis la tempon por ekzercadi la gramatikajn regulojn, unu la substantivojn, alia la verbojn k.c. …*

Poste oni uzis kiel studmaterialon letero el Odeso [Ukrainio]. F-ino Olga Christensen estis elektita kiel kasisto de la Esperanto-societo. Toksvig skribas:

*Kompreneble oni priparoladis por kia celo estos uzata nia 'plenega' kaso; la respondo unu-voĉe estis: agitado. Sed la kasistino (kiu entute estas tiu, kiu plej bone posedas la lingvon) dum granda gajiĝo, precipe de l' flanko de sinjoroj, postulis, ke ni absolute devu tiom ŝpari, ke ni povu kelkfoje havi se eĉ malgrandan tason da kafo!*

Kromaj informoj pri Societo Esperantista de Danujo bedaŭrinde estas nulaj. Supozeble ĝi spertis sorton similan al tiu de multaj aliaj grupoj ĉi tie. Dum tralegado de la danaj Esperanto-gazetoj – ekde 1907 ĝis 2008 – lige al mia ellaborado de la jubilea ekspozicio Esperanto en Danlando – multfoje mi konstatis, ke tuj post kurso por komencantoj estas fondita nova Esperanto-klubo. Post entuziasma ekflamiĝo ofte rapida estingiĝo, forvelko. La kaŭzoj certe estas multaj, pli-malpli komplikaj. Malgraŭ nun 58-jara okupiĝo pri la Internacia Lingvo mi ne estas la ĝusta persono por analizi kaj prijuĝi tiun fenomenon, ĉar mia lerneja laboro neniam ebligis tre regulan partoprenon en la kluba vivo. Sed mi havas la impreson, ke la funkcio de tiu aŭ alia Esperanto-societo ofte estis tro dependa de nur unu-du-tri personoj. Forfalo pro ia kaŭzo facile danĝerigis la pluan ekziston de la societo.



*Peder og Marie Toksvig, ĉirkaŭ 1925*

La ekonomia situacio de Nykjøbing Venstreblad ne estis stabila. Redaktoro Toksvig certe devis uzi multe da forto por sia gazeto – hejme li ja devis satigi ses stomakojn – eble li sentis necese redukti aŭ eĉ tute ĉesigi sian laboron per kaj por la Internacia Lingvo. Ni ne scias. Kiel jam menciite Nykjøbing Venstreblad ĉesis aperi en junio 1901. En la sama monato diversaj socialdemokrataj unuiĝoj fondis la gazeton Holbæk Amts Socialdemokrat kun Toksvig kiel redaktoro.

La 24-an de decembro 1904 la ŝipo Invernia forlasas la havenon de Liverpolo en Britio. Inter la pasaĝeroj estas Peder Kristian Toksvig el Danlando. 10 tagojn poste oni atingas la grandurbon Nov-Jorko. Toksvig rapidas al Perth Amboy en la ŝtato Nov-Ĵerzeo, por eklabori kiel redaktoro de la danlingva gazeto Perth Amboy Folkeblad. Tiun oficon promesis al li la dana konsulo kaj la loka librovendisto I.P. Holm. Nun montriĝis, ke la planoj pri la gazeto estas iom nebulaj, kaj kiam Toksvig sciiĝas, ke la opinioj/vidpunktoj de la gazeto atendeble devos ŝanĝiĝi laŭ diversaj eksteraj moninteresoj, li tute ne hezitas rezigni. Anstataŭe li ekzamenas la eblecon establi en Perth Amboy popolan altlernejon por danaj enmigrintoj, sed por tio la tempo ankoraŭ ne estas matura en la tiama Usono.

La 11-an de aprilo 1905 Toksvig revenis al Manhattan kun ege modesta monsumo en la poŝo. El la 5 dolaroj pruntitaj de dano en Perth kaj la 18 dolaroj kunportitaj el Danlando restis tre malmulte. Li enloĝigis sin en teretaĝa ĉambro je n-ro 234 de la 27-a Strato. Al sia edzino Marie en Danlando li skribis, ke li supozas povi vivteni sin/ekzisti tiel longe kiel necese – kaj resti sana kaj forta – per 15 cendoj en tago, nome jene: bananoj: 5 cendoj, pomoj: 5 cendoj, ternuksoj: 5 cendoj – do per 1 dolaro kaj 5 cendoj en semajno. Li krome atendis ricevi liberan trinkakvon. La ĉambro kostis 1,50 dolarojn semajne. Kelkfoje diversaj danoj en la grandurbo donis al Toksvig senkostan manĝaĵon.

Dum sia restado li klopodis akiri laboron kiel serviston, pordgardiston aŭ ion similan. Li plendis pro la grandaj distancoj kaj la altaj prezoj por la subtera fervojo. Li ne estis bonŝanca. Posttagmeze la 18-an de aprilo finiĝis la luperiodo de la ĉambro. La monujo estis preskaŭ malplena. Tamen li ne perdis la kuraĝon, kiel bone montras jenaj linioj el letero al Marie: “Ne gravis. Mi aĉetis bileton (1½ dolaroj) por la vaporŝipo C.V. Morse, pompe aranĝita ŝipo, kaj iris per ĝi al Troy … Tie mi staras, riĉa je ideoj, sed malriĉa je mono … En la poŝo mi havas precize unu dolaron. Mi tuj iris al la unitariana pastro, kies adreson mi vidis ĉe stratangulo.”

Verdire, por Peder Kristian Toksvig la komenca periodo en Usono estis malfacila, ege malfacila. Fine de julio Marie Toksvig kun la kvar infanoj: Signe – ŝi havis 14 jarojn – Gudrun (11), Harald (10) kaj Frithjof (8) forlasis Danlandon por iri la longan vojon al Troy en la usona ŝtato Novjorkio; finfine la familio reunuiĝis. – Pri la sekvaj 15-16 jaroj ni scias nur malmulte. Dansk Samvirke – unuiĝo por danaj elmigrintoj – informas,

ke Peder Kristian Toksvig de tempo al tempo verkis artikolojn por usonaj kaj dan-usonaj gazetoj pri aktualaj aferoj. Li krome regule liveris materialon al pluraj gazetoj en Danlando. Serio da rakontoj verkitaj de Marie Toksvig aperis en diversaj dan-usonaj gazetoj kaj revuoj. Mallonge post la Unua Mondmilito – verŝajne en 1921 – la gedza paro revenis al Danlando. Peder Kristian forpasis en 1931, Marie 5 jarojn poste.

**3. Finaj vortoj**

Povas esti, ke la lernolibro de Christian Nielsen (Vejbæk) estis pli bonsenca ol sukcesa. La ampleksa, ne-subskribita recenzo pri la verko en Flensborg Avis estis tre kritika. Eble la laboro de Peder Kristian Toksvig per kaj por la Internacia Lingvo estis mallongedaŭra (du monatojn antaŭ sia elmigro al Usono li letere enmanigis la "Esperantan torĉon" al Frederik Skeel-Giørling (1876-1910), kiun multaj konsideras la vera "Patro de la dana Esperanto-movado". Sed kiel tre fruaj pioniroj de nia nobla afero tiuj du personoj sendube meritas pli ol unu frazon mallongan en la historio de la dana Esperanto-movado.

**P.S.** Rilate la infanojn ni havas detalajn informojn nur pri Signe (1891-1983). En 1914 ŝi ricevis stipendion de Troy High School; tio donis al ŝi la eblecon akiri altan edukiĝon. Ŝi studis latinidajn lingvojn ĉe Cornell University kaj bakalaŭriĝis en 1916. – Multjara kariero kiel reportero, redaktoro, verkisto. En 1918 Signe edziniĝis al la renoma literaturisto Francis Hackett (1883-1962). En 1926 la paro ekloĝis en la sendependa Ejro, lia hejmlando. Sed iliaj idealismaj esperoj povi kontribui al la konstruado de la kulturvivo de la nova Irlando ne plenumiĝis. Iliaj tre liberalaj ideoj – Signe jam en juna aĝo alproprigis al si la demokratiajn kaj progresemajn idealojn de la patro – ne plaĉis al la aŭtoritatoj kaj la katolika eklezio. La severa irlanda libro-cenzuro trafis ilin ambaŭ. Tial la paro en 1937 transloĝiĝis al Danlando. En 1939 ili faris longan vojaĝon en Usono por flegi eldonistajn interesojn. La invado de germanaj trupoj (09.04.1940) en Danlandon malebligis ilian revenon. Forte apogite de la dana ambasadoro Henrik Kaufmann (1888-1963) Signe Toksvig verkis artikolojn pri Danlando, kaj 1942-1945 ŝi sola prizorgis The Danish Listening Post; ĝi estis novaĵbulteno, kiu informis pri la okupita Danlando kaj la rezista movado. Ŝi faris ankaŭ prelegojn kaj ellaboris artikolojn pri Danlando kaj dana kulturo, ekz. pri la verkisto Johannes V. Jensen (1873-1950) okaze de lia ricevo de la Nobel-premio pri literaturo en 1944. Pro sia laboro por Danlando Signe Toksvig ricevis en 1946 la Liberec-medalon de Reĝo Kristiano X. Komence de la 1950-aj jaroj la geedza paro revenis al Danlando. Francis Hackett forpasis en 1962, Signe Toksvig en 1983.

*Antaŭ 125 jaroj, la 26-an de julio 1887, en Varsovio aperis la Unua Libro: Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro (por Rusoj), verkita de L. Zamenhof*

KOSMOS 1939, n-ro 9, p. 69



# Martinus 9
# La akceptemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 1

de Erik Gerner Larsson

Dum mi en la antaŭaj artikoloj montris, ke la tuta surtere vivanta homaro nuntempe travivas la eliradon tra la mondo de granda nova mondimpulso de “La dia kread-principo”, kiu konkludas en kreado de komune religia kaj materia bazo por la tuta homaro – mi en sekvantaj artikoloj penados klarigi, kiamaniere ĉi tiu impulso estos akceptata. Kiel enkonduko de ĉi tiu analizo mi permesas al mi citaĵon el la “Libro de la Vivo” paragrafoj 120 kaj 121:

**120.** “Oni ja devus supozi, ke ĉiuj surtere vivantaj homoj kun entuziasmego kaj elkore akceptus tian novan dian impulson, tian impresegan kaj eksterordinaran helpon, tian ampleksan kaj inspirantan forton de pli altaj mondoj. – Sed ne, tute ne estas tiel. La afero nome estas, ke la akceptemo de individuo antaŭ pli altaj fortoj, – kiuj en ĉi tiu okazo estas ĝia akceptemo de nova kulturo – ne estas io, pri kio ĝi povas decidi per sia volo tiel, kiel ĝi ekz. per ĉi tiu povas decidi, ĉu ĝi volas stari aŭ sidi, ĉu ĝi volas krii aŭ mallaŭte paroli, ĉu ĝi volas malfermi aŭ fermi siajn okulojn k.t.p. La ĉefa afero pri la akceptemo de la surtere vivanta homaro rilate al nova spirita bazo, tiel ne estas ĝia volo, sed kontraŭe la spirita, malantaŭ ĝia volo ekzistanta spirita kvalito, kiu denove estas reprezentata de la gvidantaj animfortoj en ĝia konscio. Ĉi tiuj fortoj estas el plej diversa naturo ĉe la individuoj, dum ili koncerne al ĉiu individuo prezentas rezulton el ĝiaj opaj spertoj aŭ travivaĵoj, ĝiaj jam ekzistantaj talentoj, kutimoj kaj emoj, kaj ĉi tiuj estas ĝuste diversaj ĉe ĉiu individuo. Ĉi tiuj fortoj tiel fariĝos la veraj volo-gvidantoj por la individuo kaj decidigas ĝian volon por aŭ kontraŭ la nova spirita kulturo.

**121.** Ĉar la surtere vivantaj homoj tre grandparte ĝuste kredas, ke la tenado de iliaj kunuloj antaŭ spiritaj problemoj nur estas demandoj pri volo kaj tial ne suspektas, ke tiel ĝi efektive, kiel ni montris, prezentas demandon pri evoluo aŭ talento, ili tre ofte erare juĝas unu la alian pro iliaj opinioj pri la vivo kaj perceptoj pri la estado. Tiaj homoj nome ĉiam agnoskas la miskomprenon, ke ilia speciala kredo kaj idealoj estas la absolutaj sole seneraraj “ŝlosiloj al la paradizo” kaj sentas sin dank’al tio indignitaj antaŭ kunuloj, kies naturo, spertoj kaj talentoj absolute ebligas, ke ili estas aŭ tiel progresintaj aŭ tiel malprogresintaj rilate al evoluo de la diritaj estuloj, ke ili absolute ne povas agnoski iliajn doktrinojn kaj perceptojn pri la vivo kaj tial estas devigataj havi tute alian vivpercepton”. (daŭrigota)

Traduko Margrethe Noll en 1939.

# Profetaĵoj pri Martinus I
## La profetaĵoj de Rudolf Steiner



de Ole Therkelsen

**1. La profetaĵoj de Rudolf Steiner pri nova mondinstruisto**


Rudolf Steiner (1862-1925) komence estis en la teozofia movado, sed jam en 1912 li malaliĝis, ĉar li malkonsentis kun la teozofoj kaj Annie Besant koncerne Kriŝnamurti-n. Laŭ li Kriŝnamurti ne povis esti la nova Kristo aŭ mondosavanto.

Steiner fondis sian propran Antropozofian Societon, kaj komence li eble kredis ke savos la mondon la antropozofio. Poste li ŝajne iom elreviĝis, kaj ankaŭ aperis al li problemoj kunlabori kun la membroj de la societo kiun li mem faris. Kiam proksimiĝis la fino de lia vivo, li ekkonsciis ke ne la antropozofio la mondon savos. Liaj vizioj montris al li ke ĝi venos el Danio.

Bernhard Løw (1843-1931) dum la lastaj vivojaroj de Steiner plurfoje gastis ĉe li en la ĉefcentro de la antropozofio en Dornach en Svisio. Nelonge antaŭ sia morto en 1925 Steiner ekhavis vizion, kiun li plupasigis al Løw en lasta interparolo antaŭ ties revojaĝo al Danio.

Steiner diris: “Mi vidas fendon en la nubaro super via propra patrio, Danio. Ĉi tie post kelkaj jaroj aperos nova mondinstruisto. Ĉar li bezonos apogon, estus tre bele se iu estos ema helpi lin!” (*Memoroj de Martinus,* paĝo 96).

La antropozofoj kontestas ke Steiner iam tion diris al Løw, ĉar en la arkivoj en Dornach ekzistas neniu skriba dokumentigo de ĉi tiu profetaĵo, sed tio ja ne malhelpas ke ĝi povas esti buŝe esprimita. – Bernhard Løw ĝin akceptis kiel mesaĝon



Rudolf Steiner (1861-1925)



Bernhard Løw (1843-1931)

ke li helpu la venontan mondinstruiston en Danio. Post sia reveno li eĉ tiel praktike procedis ke li kolektis ĉirkaŭ si rondon da junaj disĉiploj en la ĝusta aĝo. Laŭ Steiner necesis supozi ke la nova mondinstruisto havos sian inicon en la aĝo 28-30 jaroj. Ili ofte kolektiĝis dimanĉe en la granda vilao de Bernhard Løw en Kirkevej 23 en Ordrup norde de Kopenhago.

Dum la unuaj sep jaroj post sia ricevo de kosma konscio, Martinus vivis en absoluta nerimarkiteco. Ne pli frue ol en 1928, tri jarojn post la morto de Steiner, li komencis senti ke la tempo nun estas matura por ke liaj aferoj diskoniĝu. En septembro 1928 Martinus skribis leteron al la direktoro de la grandmagazeno Magasin, Carl Vett, kiu estis konata pro sia intereso pri spiritaj aferoj, kaj tiu do plusendis Martinus-on al la maljuna saĝulo Bernhard Løw, kiu estis la gvidanto de la Antropozofia Societo en Danio.

Kiam la kontakto estis establita, Martinus plurfoje estis invitita al Løw dimanĉe por prezenti siajn simbolojn kaj rakonti pri la eterna mondbildo. Løw opiniis ke Martinus tre penseble estos la nova mondinstruisto, ĉar bone kongruis kun la priskribo de Steiner ke Martinus ekhavis kosman konscion ĵus iĝinte 30-jara. La unua disĉiplo de Bernhard Løw iĝis tre ĵaluza kaj diris ke ne Martinus faros la novan mondinstruon. Løw tiam demandis al li: “Ĉu vi povas desegni ĉi tiujn simbolojn?” – Ne, tion li ja ne kapablis. – “Sed do ja Martinus devas fari tion”, diris Løw.

Bernhard Løw iĝis unu el la plej fidelaj kaj helpemaj amikoj de Martinus dum ĉi tiuj unuaj malfacilaj jaroj, kaj li pagis la pliparton de la kostoj por eldoni la unuan volumon de *La Libro de la Vivo*, kiu tamen aperis nur en 1932, unu jaron post la forpaso de Løw.

## 2. Steiner profetas pri “la etera reveno de Kristo”

En letero datita en Charlottenlund la 16-an de oktobro 1929 al ĉefsekretario de Martinus kaj prelegisto Erik Gerner Larsson, Bernhard Løw atentigas pri alia profetaĵo de Rudolf Steiner pri la reveno de Kristo, publikigita en Steiner Cyklus 1909-1910. Løw klarigas ke laŭ Steiner ĉirkaŭ 1930 aperos alt-inicito, kiu montros “Kriston en etera formo”. (Die ätherische Wiederkunft Christi).

Farinte vicon da privataj prelegoj, Martinus la 1-an de decembro 1930 eldiras sian unuan prelegon publikan, “Nova spirita mond-impulso”, en la salono de la Altlerneja Asocio en strato Forhåbningsholms Allé 18 de Frederiksberg. Antaŭ la prelego Martinus metis sur ĉiun seĝon presaĵeton titolitan *Klarigaj informoj pri mia spirita laboro,* kaj ĉi tiu verkaĵo estas zorge konservita por la estonteco kaj represita kiel artikolo n-ro 2 en *Artikolaro 1.* (AS1, n-ro 2).

Lige al la etera reveno de Kristo estas tre interese ke Martinus mem substrekas ke la reveno de Kristo ne okazos per tio ke la homoj denove sekvos Kriston en fizika formo. Li estos trovebla nek en la dezerto nek en la ĉambroj (Mateo 24.26).

La reveno de Kristo okazos en la formo de “la spirito de vero” aŭ “la porparolanto, la Sankta Spirito”, tio estas, kiel spirita scienco. Ĉi tiun temon Martinus pritraktis sufiĉe detale en la tuta ĉapitro 1, “La reveno de Kristo”, en la libro *La intelektigita Kristanismo* (eldonita postmorte en 2004).

Pri la verko *La Tria Testamento* oni do povas diri ke ĝi estas esprimo de la etera reveno de Kristo. Same kiel Kristo elpaŝas kaj diras kiu li estas, tiel la nova mondinstruisto ankaŭ elpaŝu kaj diru kiu li estas, kaj kio li estas, kaj oni devas diri ke tion Martinus faris kun granda aŭtoritateco. Li ne forkaŝis sin. Martinus ankaŭ volis ke estonte ne estu dubo ĉu li tion diris aŭ ne.

En sia parolado la 11-an de aŭgusto 1979 je sia 89-jara naskiĝdatreveno Martinus ekzemple diris rekte ke lia suma verko *La Tria Testamento* estas la plenumiĝo de la profetaĵo pri la reveno de Kristo.

Martinus: "Nun mi havas la aŭtoritaton diri ke *La Tria Testamento* estas *la porparolanto, la Sankta Spirito."* (Kosmos, n-ro 7/2008).

**3. La vidvino Marie Steiner vizitas Bernhard-on Løw**
Bernhard Løw, kiu dum la lastaj kvar vivojaroj de Steiner ofte gastis ĉe li, invitis la vidvinon Marie Steiner viziti lin en Danio, kaj li tre volis ke ŝi renkontu Martinus-on. Vidinte foton de ŝi, Martinus diris: "Jes, sed ŝi ne volas paroli kun mi." Sed Løw diris ke li tamen kredas ke ŝi volos paroli kun li. Kun d-ro Carl Asche, kiu konis kaj la teozofion kaj la laboron de Martinus, ili estis renkontontaj ŝin en granda vilao en Charlottenlund, kie ŝi loĝadis dum sia restado en Danio. Martinus preferis atendi ekstere en arbareto, do oni alvoku lin se ŝi volos paroli kun li.

Løw tiam rakontis al ŝi iom pri Martinus, interalie ke li povas respondi ĉiun ajn spiritan demandon kiun oni submetus al li. Nun oni ja povus kredi ke s-ino Steiner ĝoje surpriziĝus aŭdante ke ŝi povos renkonti tian personecon, sed ne, male ŝi ege agaciĝis kaj tute ruĝiĝis: Kiel do Løw povas aserti ion tian? – Ŝia edzo jam donis al la mondo ĉion kion ĝi bezonas. – Ne, ŝi ne parolos kun Martinus. Oni povis havi la impreson ke iuj antropozofoj rigardas Martinus-on kiel konkuranton de Steiner kaj lia antropozofio, kaj tiu sinteno tute surprizis Bernhard-on Løw.

Bernhard Løw: "Kion do Martinus postulas de la homoj? – Nenion! Li tute ne volas fortiri la homojn el la kampo kiun ili atingis. Li nur simple informas pri la maniero kiel funkcias la energio kaj lasas al la homoj tute libere sekvi ĉi tiujn informojn aŭ ne, tute kiel ilia natura evolua ŝtupo permesas al ili." (Okkultisten, novembro 1945, paĝo 173).

Traduko Jens S. Larsen en 2012

## NOTO

**Granda movada atingo en la reto**
Verŝajne la plej konata programo por maŝina traduko estas google-translate. Ĉi-jare en 2012 kiel la 64-a lingvo Esperanto aperis ĉe la adreso: http://translate.google.com. Pro la alfabeta ordo la internacia lingvo, Esperanto, havas okulfrapan lokon najbare al la nacia lingvo, English. *| Ole Therkelsen*

INFORMO PRI
## LA TRIA TESTAMENTO


La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 38 34 62 80
fakso (+45) 38 34 61 80
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
UEA-kodo mins-d
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca), Mathias Dalmose, Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.
Kompostado: Dan Elhaûge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj
Prezo en EU: DKK 75,00 aŭ EUR 10,00
Prezo ekster EU: DKK 60,00 EUR 8,00 aŭ USD 12,00
Unuopa kajero: DKK 40,00
Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.



*Kiam ni vidas, ke foliaro kaj floroj velkas dum la aŭtuno, tio ja reale signifas, ke la arboj kaj plantoj turnas sian konscion de la ekstera fizika mondo al ilia "interna mondo". Ĉi tie ni vidas pli altan spiritan principon ripetita en pura fizika formo.*
*(Livets Bog, vol. 3, par. 642)*